**Okazos la 36a Internacia Infana Kongreseto (IIK), apud Vilno, de la 23a ĝis la 30-a de julio, 2005**

# *Salto al Balto*

Denove ni invitas infanojn inter 6- kaj 13-jaraj kun bona rego de Esperanto al neforgesebla semajno. La IIK okazos apud lago en arbaro, 36 kilometrojn nordoriente de la urbo de la Universala Kongreso (UK). Dormlokoj estas en 5-6 apudaj dometoj; ĉambroj havas inter 1 kaj 8 dormlokojn. Ĉiu dometo havas duŝojn kaj necesejojn. Estas centra kuirejo kaj manĝsalono kun cent lokoj, kaj kvar komunaj ĉambroj por ludado kaj grupaj programoj.

La ejo nomiĝas litove "Pailgio perlas" kiu signifas "Perlo de Pailgis". Pailgis estas la nomo de la arbaro kaj lago en la distrikto Švenčionys. Plej proksima urbo estas Pabradė. Sed la IIK-ejo troviĝas en plena naturo kaj estas atingebla el Vilno nur per privata transporto. La kongresetanoj vojaĝos per luita buso el la UK en la komenca sabato (planite je 17.00 h) kaj revenos simile en la ferma sabato (planite ĝis 10.00 h).

Ni havos ekskluzivan uzon de la ripozejo, do ni povos krei unikan esperantan etoson. Apud la loĝejo troveblas infana ludejo, sporta tereno por i.a. korbopilko, retpilko kaj futbalo. Apude estas lago kun observanto por kontroli la sekurecon de naĝantoj. Ĉe la lago eblas uzi boatojn kaj akvo-biciklojn. Estas eksterdomaj tabloj kaj seĝoj, kaj subĉiela rostejo, ekzemple por baki ŝaslikojn kaj similaĵojn.

Inter planataj programeroj estas man-laboroj, muzikado, kuk-bakado, paper-faldado, sportaj olimpikoj, trezor-serĉo, kvizoj kaj skeĉumado. La organizantoj de la kultura programo por la UK aktive planas interesajn erojn por la infanoj. Estos konvenaj gvidantoj (ni celas unu por ĉiu kvino da infanoj, kun almenaŭ unu litova lokulo). Kuiradon prizorgos dungitoj de la ripozejo; eblos atenti vegetaranojn kaj aliajn dietajn bezonojn de infanoj.

La kotizo kovras kostojn de restado, tri manĝoj tage, intermanĝetoj kaj programo de la vespero de la 23a de julio ĝis la mateno de la 30a de julio, unu tut-taga ekskurso kaj alven/forira transporto. Ĝi ne inkluzivas asekuron, kiun la gepatroj mem devas prizorgi, liverante pruvilon pri tio. Aliĝo ekestas definitiva kaj estos konfirmita post ricevo de minimuma antaŭpago de 130 eŭroj al la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio (UEA), kies alven-dato determinas la plenan sumon pagendan. La cetero estos pagenda plejlaste al la kasisto de UEA komence de la Universala Kongreso.

## Aliĝilo por la 36a Internacia Infana Kongreseto



Vilno, Litovio, 23-30 julio, 2005

*Bv. plenskribi apartan aliĝilon por ĉiu infano.*

Familia nomo:

_____

Persona nomo: _____ Vok-nomo (se havas):_____

Knabo☐/Knabino☐ Naskiĝdato (jaro/monato/tago): _____

Adreso (nacilingve, latin-litere):

_____

_____

Telefono: _____ Ret-adreso: _____
(laboreja/hejma?) (familia/laboreja/nerekta?)

Familia/Infana Hejmpaĝo:

_____

Nomo, UEA-kodo kaj (se alia ol supre) adreso de la plenkreskulo kiu aligas la infanon:

_____ ☐☐☐☐-☐ _____

Nomo kaj adreso de tiu kiu akompanos la infanon al Vilno:

_____ Kun aŭto? Jes☐/ Ne ☐

Ĉu la infano estas vegetarano? Ne ☐/ Jes☐. Ĉu havas aliajn dietajn limigojn aŭ bezonojn?

_____

Ĉu la infano havas alergion aŭ ion atentindan pri la san-stato:

Ne ☐/ Jes☐. Nome:

_____

Kiom estos la lingvoscio?

Sufiĉa ☐ Bona☐ Tre flua☐

Se la infano estas muzikema, nomu la instrumento(j)n:_____

Ĉu oni povos kunporti instrumento(j)n?Kiu(j)n?_____

Kiujn ludilojn/aktivigilojn/E-librojn la infano povos kunporti?_____

Kiajn erojn la infano dezirus en la programo?

_____

Kiujn kontribuaĵojn povos fari al la programo?

_____

Nomu la ĉefajn interesojn de la infano: _____

_____

Jen foto de la infano: (liveru fizike aŭ kiel JPEG)

☐ Tio estas nur por via arĥivo.

☐ Por la hejmpaĝo de IIK.

Mi aldonas biografieton pri la infano (10-20 linioj), informante, i.a. kiel tiu eklernis kaj uzas Esperanton kaj aliajn lingvojn.

☐ Por via arĥivo. ☐ Por la IIK-hejmpaĝo.

Ni aldonas rakonteton, verketon de la infano mem (eventuale kun koloraj desegnaĵoj kaj/aŭ fotoj), cele al aperigo en la hejmpaĝo de IIK kaj eventuala IIK-kajero. Jes☐/Ne☐.

Mi atestas per mia subskribo, ke la infano komprenos ke (krom krizokaze) ŝi/li rajtas paroli nur esperante dum la IIK.

Mi pagos/is al UEA la sumon de EUR_____ (alivalute: _____ ____ )

en la dato _____, pere de _____.

Subskribo:_____ Loko: _____ Dato:_____

Se la spaco por iuj respondoj ne sufiĉas, bv. skribi tion sur aparta paperpeco aŭ sendi ret-mesaĝon.

**Bv. sendi la aliĝilon al la komisiito kaj la pagon al la Centra Oficejo** (adresoj apude). Pri pag-manieroj al UEA, vidu ilian hejmpaĝon, aŭ la Jarlibron.

Loĝantoj de Litovio rajtas pagi en lidoj al LKK.

Bonvolu sendi al mi informilon pri ☐ UEA ☐ ILEI ☐ *Juna amiko*.

Jen la kotizoj en eŭroj: A- kaj B-landoj laŭ la UK-difino:

| Limoj | A-landoj | B-landoj |
|---|---|---|
| 31 mar 2005 | 160 | 130 |
| 30 junio 2005 | 190 | 160 |
| poste | 220 | 190 |

**Rabato por helpantoj kaj infanoj post la unua el unu familio: 15%**

Ni akceptas nur infanojn inter 6- kaj 13-jaraj, kiuj jam komprenas kaj parolas Esperanton; tiuj povas veni el E-familioj aŭ lernejaj klasoj. Infanoj, helpantoj kaj gvidantoj ricevas aŭtomatan kaj senpagan aliĝon al la UK. Ĉi tiu informilo/aliĝilo estas dissendita kun *Juna amiko* 2004/4, pliaj ekzempleroj estas peteblaj de la komisiito, al kiu vi bv. sendi la apudan aliĝilon.

Komisiito: Stefan MacGill
Pannonia u. 30 / I / 6
HU-1136 Budapest, Hungario
tel. (+36 1) 349-5207
<stefan.macgill@galamb.net>
<s_macgill@yahoo.co.nz>

Centra Oficejo: Nw. Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam, Nederlando
<kongresoj@co.uea.org>

Respondeculo pri IIK en LKK:
S-ino Nijole Stakeniene
<nijolla@omni.lt>


***Malaliĝoj:*** Kaze de skriba malaliĝo al la komisiito aŭ la CO antaŭ 30 junio 2005, la pagita sumo estos redonita minus 30 EUR por ĉiu infano. Aliĝo estas, sub certaj kondiĉoj kaj post interkonsento, transigebla al alia infano.

Pri ceteraj kondiĉoj de aliĝo, aliaj novaĵoj kaj listo de partoprenontoj, bv. vidi la hejmpaĝon de IIK, ĉe la paĝaro de UEA: <http://www.uea.org>

Jen la Unua KomunIIKo.
Postaj komunIIKoj estos sendataj ret-mesaĝe, nur al la personoj kiuj aligis infanojn kaj al konataj interesiĝantoj.